# Unuiĝintaj Verdaj Partioj de Eŭropo

# Nova Verda Konsento por Eŭropo

Eŭropo bezonas novan direkton. La financa krizo kaj kreditimplodo igis klare videblaj la mankojn de aktualaj ekonomia kaj sociaj politikoj. Ili evidentigis plian ĉiean malsukceson. La mondo alfrontas gravan kaj fundamentan resursan mankon, kiu efikos al ĉiu aspekto de niaj vivoj, de la manĝaĵo, kiun ni manĝas ĝis la energio, kiun ni uzas. Ni krome  riskas tempomankon por haltigi plenan klimatkrizon

Ĉi tiujn 'krizojn' oni rigardu kiel okazon por transformi nian ekonomian kaj socian sistemon en iun, kiu ofertos al la venontaj generacioj estontecon sur bazo de stabileco, sufiĉo kaj daŭrigeblo.

Eŭropo alfrontas socialan, ekonomian kaj ekologian defiojn, kiuj transiras landlimojn. Kiel la financa krizo refoje montris, nur per kunlaborado - je eŭropa kaj tutmonda nivelo - ni povas superi ĉi tiujn defiojn. Tio necesigas Eŭropunion forte agi por la estonteco de ĉiuj siaj civitanoj kaj loĝantoj. **Verduloj volas konstruadi solvojn por daŭrigebla estonteco.**

Alfronti la defiojn prezentas realajn ŝancojn. Moviĝi al pli verda ekonomio kaj batali kontraŭ la klimatŝanĝiĝon akcelos dungadon kaj igos nin pli memsufiĉaj, reduktante nian difektan dependecon de energiimportado. Pli daŭrigebla pritrakto de nia agrikultura, mara kaj energia resursoj estas kerna en tempo, kiam energia kaj manĝaĵa prezoj suferige trafas homojn kun malalta kaj meza enspezo.

**Verduloj volas respondecan Eŭropon.** Eŭropunio defendu socialajn sistemojn kaj laborkondiĉojn kontraŭ la premo de furioza kaj senbrida konkurenco, kaj en kaj ekster Eŭropo. Ekonomiaj interesoj ne okazu koste de homaj kaj civitanaj rajtoj. Eŭropunio aŭskultu kaj estu respondeca al siaj civitanoj kaj loĝantoj, dum ĝi antaŭenigu pacon, demokration kaj homajn rajtojn tutmonde.

La superrega novliberalisma ideologio en Eŭropo establis sistemon, en kiu la profito de malmultaj homoj antaŭas la ĝeneralan bonfarton de ĝiaj civitanoj. Ili metis la profiton de poluciantaj industrioj antaŭ la naturmedian kaj la publikan sanon. La mantro de konkurencpovo kaj kresko estas uzita por pli malaltigi socialajn normojn kaj laborkondiĉojn. La novliberalisma plimulto en la eŭropaj parlamento, konsilio kaj komisiono kulpas pro cedo al la postuloj de industriaj lobioj metinte rapidan profiton antaŭ la ĝeneralan utilon. **Verduloj proponas realan alternativon por Eŭropo.**

**La Verda Nova Konsento signifas:** solidaran Eŭropon, kiu povas garantii al siaj civitanoj bonan vivokvaliton sur bazo de ekonomia, sociala kaj ekologia daŭrigeblo, vere demokratan Eŭropon, kiu agadas por siaj civitanoj kaj ne nur sin reduktas al industriaj profitoj; Eŭropon, kiu agadas por verda estonteco.

## Reala alternativo por Eŭropo:<br>sekurigi nian energion kaj ekologian estontecon

**Ni bezonas revolucion pri resursoj** por forlasi nian nunan vojon de troa ekspluatado kaj ekologia detruado. Se ni daŭrigas marodi niajn limigitajn naturajn resursojn, ni bezonos du planedojn por daŭrigi nian vivostilon ene de 25 jaroj. Ĉi tiu vojo ne nur ekonomie estas nedaŭrigebla, ĝi grave minacas nian klimaton, ekologiajn sistemojn kaj biologian diversecon.

**Komerco kiel kutime ne akcepteblas.** La efiko de resursa krizo kaj danĝera klimatŝanĝiĝo montrus iun financan kaj ekonomian krizon kiel nana. Bonŝance plej multaj solvoj estas jam

disponeblaj. La aktuala ekonomia malrapidiĝo estas taŭga okazo por transformi nian sistemon tiel, ke ni povas eviti la ekstremajn sekvojn de la resursaj kaj klimataj krizoj, kaj sekurigi bonan vivokvaliton.

Por eviti danĝeran klimatŝanĝiĝon ni grave reduktu niajn forcejgasajn emisiojn . Verduloj volas, ke EU devontigu sin redukti la emisiojn per 40% ĝis 2020 kaj per 80-95% ĝis 2050, surbaze de la niveloj el 1990, konforme al la aktualaj rekomendoj de IPCC de UN. Eŭropo ankaŭ ludu ĉefrolon en forĝado de deviga internacia klimatinterkonsento en la UNa kadro surbaze de la plej aktuala scienco. Tiu interkonsento devigu la industriajn landojn realigi la necesajn emisioreduktojn, kaj krome agnoski sian respondecon subteni kaj adapti la penojn en evolulandoj, inkluzive de tiuj por reduktado de gasemisioj, estiĝintaj pro senarbigo kaj arbara degenerado, precipe en la tropikaj arbaroj.

**Batalo kontraŭ klimatŝanĝiĝo estas ambaŭflanke gajniga procezo.** Kombinaĵo de ambiciaj kaj devigaj celoj, de instigoj kaj de publikaj investoj en verdajn teknologiojn kaj servojn helpos krei milionojn da verdaj laborpostenoj en Eŭropo kaj dekmilionojn tutmonde, kiuj estas tre bonvenaj en periodo de ekonomia malprogreso. EU fiksu por si mem la celon estigi kvin milionojn da verdaj laborpostenoj dum la venontaj kvin jaroj.

Ni serioze ŝanĝu la aktualan malŝpareman manieron uzi energion, dume grandskale vastigante energiĉerpadon el renovigeblaj fontoj. Tio reduktos nian danĝeran dependecon de importo de malpuriga energio el malstabilaj landoj, kun la malutila fluktuado, kiun ĉi tiu kaŭzis por niaj ekonomioj kaj socioj.

Ni profitu el la jam ekzistantaj metodoj ŝpari energion. Uzi malpli da energio kaj uzi ĝin pli bone estos decide grave por daŭrigi bonan vivkvaliton en tempo de altiĝantaj energiprezoj. **La Verduloj volas, ke Eŭropo atribuu ege pli grandan prioritaton al energia mastrumo,** fiksante devigan celon redukti energikonsumon per 20% ĝis 2020, kaj ankaŭ subteni kaj antaŭenigi la inteligentan projektadon de varmiga kaj malvarmiga teknologioj kaj en la industria kaj en la loĝeja sektoroj.



**Renovigeblaj energifontoj estu la kerno de la Eŭropa energipolitiko** por la 21a Jarcento. Verduloj alvokas al la estigo de Eŭropa Renovigeblaĵa Komunumo (ERENE) por subteni la longatempan celon de 100%a energio el renovigeblaj fontoj. Ni bezonas komunan investan iniciaton en verdajn teknologiojn, en kiuj la Eŭropa Investobanko ludu rolon. Vere rapida evoluo de renovigeblaĵoj necesigas novan pritrakton de energiprovizado: efektivan malligon de proprieto je distribuado disde produktado, kaj antaŭenigon de retaro sen landlimoj kaj pli inteligentan uzon de energio.

**Atomenergio ne kontribuas en solvo pri klimatŝanĝiĝo.** Altaj investadoj en tiu senelireja teknologio ne povos helpi la urĝe necesajn emisioreduktojn kaj deturnos malabundajn financajn rimedojn de la antaŭenigo de daŭrigebla energiproduktado.
Uranio estas limigita brulaĵofonto kaj EU estas pleje dependa de ĝia importo el malstabilaj landoj, sekve atomenergio klare ne estas la solvo de nia longtempa energisekureco. Krome la nedisigeblaj riskoj de atomenergio estas hodiaŭ same realaj, kiel ili ĉiam estis, ĉu pri operaciado, brulaĵoproduktado aŭ regado de rubaĵoj, por ne mencii la eblecon de teroristaj atencoj kaj proliferado de atomarmiloj al dubindaj reĝimoj kaj eĉ krimulaj grupoj.

Por radikale transformi la manieron uzi energion kaj fini nian damaĝantan dependecon de petrolo ni ankaŭ iĝu verdaj. La transporto-sektoro estas la plej rapide kreskanta fonto de homfaritaj forcejaj gasoj.



**EU aktive strebu al estigo de daŭrigebla transportsistemo.** Fini la rektan kaj nerektan subvenciadon de neefikaj kaj malpurigantaj transportmanieroj, kiaj aviada kaj surstrata transportado estas grava paŝo al enkalkulado de la plenaj ekologiaj kostoj. Ni volas plirapidigi la investadon en tuteŭropajn fervojajn konektojn kaj retojn. Vartransporto estu forigata de vojoj kaj multe pli grandskale okazu fervoje kaj riverŝipe. Favorpreza publika transporto kaj daŭrigeblaj transportaj alternativoj en niaj urboj, kiaj biciklado kaj piedirado, estu antaŭenigataj.

La resursokrizo, kiun ni vidas, estas multe pli ol nura problemo pri energifontoj. Pli daŭrigebla pritrakto de niaj agrikulturaj kaj maraj resursoj estas nemalhavebla por nia bonfarto, la sano de niaj ekologiaj sistemoj kaj ties biologia diverseco.

**Verduloj deziras, ke Eŭropo certigu al siaj civitanoj la haveblon de sana manĝaĵo kontraŭ justaj prezoj,** anstataŭ la limigitaj elektoj, kiujn la manĝaĵindustrio deziras oferti al ili. La eŭropa agrikultura, fiŝkaptada kaj manĝaĵa politikoj instigu reciprokan respondecon inter kultivistoj, fiŝkaptistoj, institucioj kaj konsumantoj.

La komuna agrikultura politiko instigis agrikulturan malrespondecon, en kiu la agroindustrio diktas la merkaton kaj produktado celas enspezi subvenciojn, sen konsidero de la ekologiaj sekvoj. Verduloj volas uzi la okazontan revizion por transformi la EUan agrikulturan politikon laŭ maniero, kiu subtenu kaj instigu kultivistojn produkti bonkvalitan manĝaĵon laŭ daŭrigebla maniero. La estonteco de agrikulturado troviĝas en biologia kultivado kaj justa komercado.

Decide grava por ĉi tio estas malpermeso pri genmodifitaj organismoj (GMO). Genmodifaj kultivaĵoj prezentas gravan minacon al la eŭropa biologia diverseco kaj plialitgas riskojn de transkontaminado de biologia kaj tradicia agrikulturo. Tial **Verduloj laboras por fari Eŭropunion kiel zonon sen GMOj.**

Agrikultura kaj manĝaĵa politiko antaŭenigu lokajn merkatojn por agrikulturaj produktoj, eliminante nenecesan transportadon. Ĝi instigu al pli daŭrigeblaj produktadaj metodoj, kiuj celas konservi la biologian diversecon kaj akvoresursojn, kaj plibonigas grundan fekundecon, reduktante la uzon de toksaj kaj poluaj insekticidoj kaj fekundenzoj. Tiu alproksimiĝo kontribuos al la redukto de la forcejgasa emisio el intensa agrikulturado. Ĝi ankaŭ reduktos la riskojn al publika sano, kiujn kaŭzis la industria agrikulturado. Bestoj estu etike traktataj kaj en kaj ekster bestobredado.



Atingo de alta nivelo de bestoprotekto estas centra en la Verda agendo. Eŭropo bezonas multe pli bonan protekton kaj por hejmaj kaj por sovaĝaj bestoj. Ni daŭre strebos al ĉesigo de la longdistanca transportado de bestoj, al pli altaj bonfartaj normoj en bestobredado kaj al pli bona efektivigo de ekzistanta leĝaro pri besta bonfarto. Pli multe estas farenda por antaŭenigi redukton de viandokonsumado pro klimatŝanĝiĝaj kialoj, nutraĵa sekureco kaj besta bonfarto. Ni volas vidi la finon de la peltokomercado kaj rapidan anstataŭigon de bestaj testoj per sen-bestaj alternativoj.

La komuna politiko pri fiŝkaptado estis ekzerco pri sindetruo, kiu pelis multajn fiŝspeciojn al danĝere malaltaj niveloj. Ĝi estu urĝe reformata. La aktuala modelo de malŝparo kaj troa ekspluatado iĝu ilo, kiu estigas ĉe fiŝkaptistoj respondecon pri daŭrigebla fiŝkaptado kaj konservado de la fiŝspecioj. EU ankaŭ multe plifortigu devigajn ordonojn (aranĝojn) por protekti niajn senŝirmajn marojn kaj reviziu siajn interkonsentojn pri fiŝkaptado kun afrikaj landoj.

**Sana Eŭropo estas bonfarta Eŭropo.** EUaj civitanoj maltrankviliĝas pri la sekureco de la aero, kiun ili enspiras, pri la akvo, kiun ili trinkas kaj pri la manĝaĵo, kiun ili manĝas. La poluado difektas la publikan sanon, kio sekve malutilas al socioj kaj ekonomioj. EU pli penu por kontraŭi la minacojn al la publika sano, kiel ajn ili estiĝas, ĉu per akvo aŭ aero, bruo, malutilaj substancoj, aŭ per la disvastiĝo de malsanoj. EU haltu la perdon de biologia diverseco, en kaj ekster la unio.

********************

## Sociala justeco kaj tutmondiĝo: la batalo por pli justa Eŭropo

**La sistemo bezonas ŝanĝon.** Verduloj volas finigi la senatentan dereguligon, kiu ebligis grandajn firmaojn dikti siajn proprajn kondiĉojn tute senkonsidere de la veraj efikoj al la ekonomio kaj la socio kiel tuto. Ĉi tiu alproksimiĝo instigis la riskajn spekulaciojn kaj troan ekspluatadon kaj kaptis nin en difektan ciklon de prosperiĝo kaj rompiĝo. Ni volas utiligi ĉi tiun okazon por evoluigi **novan ekonomion, kiu celas longdaŭran prosperon, ne tujan profitemon.** Ni deziras respondecan kaj stabilan Eŭropon, kiu investas etike kaj en tion, kie prospero estas difinita kiel la bonfarto de la tuta loĝantaro.

**Financaj merkatoj estu metataj je kondukŝnuro,** por ke ili ĉesu esti kazinoj, kie oni spekulacias per loĝejoj kaj espezoj de homoj. Ilia translandlimeco postulas kunordigitan eŭropan respondon, kiu kondukas al internaciaj penoj. Ni bezonas EU-nivelan kontrolorganizon kun povo - institucion, kiu ekzamenas kaj reguligas financajn merkatojn kaj servojn. EUa regularo malebligu ĉian impostan fraŭdon kaj celu eviti danĝeran impostan konkurson profite de enspezoj kaj ŝparoj de entreprenoj, kiuj subfosas la socialan justecon. La reguligo de la financaj merkatoj ankaŭ implicas la intertraktadon de internacia interkonsento por malpermesi ĉiujn impostajn oazojn.

Kredito estu ligita al realismaj taksoj kaj riskoj. La plej gravaj ekscesoj de senbridaj merkatoj estu bridataj, precipe la danĝeraj kontraŭ-haŭsaj spekulaciaj praktikoj de negocistoj, kiaj 'heĝaj fondusoj'. En la financa sektoro astronomiaj salajroj kaj gratifikoj, kiuj rekompencas troriskemon kaj malzorgemon estu haltigataj. Verduloj delonge rekomendis la enkondukon de imposto pri financaj negocoj, kiu reduktus spekulacion kaj produktus rimedojn, kiuj estus uzeblaj por financi diversajn socialajn kaj ekologiajn celojn, kiuj aktuale estas preteratentataj pro malsufiĉaj rimedoj.

La financaj merkatoj estu restrukturataj tiel, ke al la ĝenerala publiko povas esti ofertata protekto. Tio signifas garantion pri ŝparaĵoj kaj pruntojn tenatajn malaltekostaj. Dum la financa krizo malmultekosta kredito estu havebla por subteni eŭropajn entreprenojn, precipe tiujn, kiuj kontribuas en la movo al pli daŭrigebla Eŭropo.

**Verda Nova Konsento alvokas al amasa investo** en edukadon, sciencon kaj esploradon en la kampo de verda, estontecorientitaj teknologioj por meti Eŭropon en la avangardon de tutmonda ekonomia revolucio.

Vere prospera, noviga, stabila kaj daŭrigebla ekonomio bezonas pli justan socion certigantan justajn laborkondiĉojn, egalajn ŝancojn kaj decan vivnivelon por ĉiuj. Eŭropo defendu socialajn valorojn kaj justecon kaj samtempe adaptiĝu al la bezonoj de ŝanĝiĝantaj tempoj. Reduktoj en protektado de la natura medio aŭ kompromisoj pri socialaj valoroj estus malproduktivaj.

**Verduloj volas plifortigi la laboristajn rajtojn.** Eŭropunio suferas pro gravaj misekvilibroj. Ĝi evoluigis striktajn regulojn pri komerca konkurenco, sed laborleĝaro kaj socialaj rajtoj dume ne sekvis. Elturniĝebloj kaj necertecoj estigis decidojn de la Eŭropa Tribunalo pri Justico, kiuj emas doni prioritaton al komercaj profitoj super laboristaj rajtoj.



Eŭropo ludu gvidan rolon per altigo de normoj anstataŭ per vetkuro malsupren pri laborkondiĉoj. Verduloj deziras Eŭropon, kiu malakceptas socialan forĵeton kaj ekspluatadon. Socialaj kaj laboraj rajtoj estu plifortigataj kaj laboristoj havu pli bonan partoprenon en decidoj, kiuj koncernas ilin, per kolektiva intertraktado.

Estu egala pago por egala laboro por viroj kaj virinoj, kaj ankaŭ por senditaj, eksterlandaj aŭ portempaj laboristoj. Egalaj ŝancoj por ĉiuj estu certigataj kaj ene de kaj ekstere de la laborejo kaj sen konsidero de sekso, aĝo, etneco, kripleco, religio aŭ seksa orientiĝo.

EUa politiko, kiu malfortigas publikajn servojn nome de konkurenco devas finiĝi. Publikaj servoj, kiaj sanzorgo kaj edukado, estas decide gravaj por la ĝenerala utilo kaj ne estu forŝakrataj per konkurencaj reguloj. Ni devas trovi ekvilibron inter la libero oferti socialajn servojn kaj servojn de ĝenerala utilo unuflanke, kaj aliflanke la devo certigi egalan, pageblan kaj universalan aliron al ĉi tiuj servoj.

**Neniu suferu la malhonoron vivi en malriĉeco.** La Verda Nova Konsento celas redukti la larĝiĝantan breĉon inter riĉuloj kaj malriĉuloj kaj garantii decan minimuman vivnormon por ĉiuj Eŭropanoj. Registaroj enkonduku minimuman salajron per leĝo aŭ per kolektivaj interkonsentoj kaj minimuman enspezon super la indico de malriĉeco certigitan de sociala asekuro por ĉiuj mizeruloj. EU gvidiĝu per la principo de egala pago por egala laboro kaj ne estu batalejo por la plej malalta salajro.

Eŭropo ofertu pli grandan stabilecon al homoj el ĉiuj aĝoj. Al pli aĝaj civitanoj estu certigata voĉo en la socio, ebligante ilin aktive partopreni en ekonomia, socia kaj civitana vivo. Tio implicas certigadon de decaj pensioj. Komunumaj servoj ekzistu por trakti la individuajn bezonojn de la malfortuloj kaj senŝirmuloj. Junuloj havu aliron al pli sekuraj laborpostenoj kaj pli bonan aliron al edukado, klerigado kaj loĝado.

**Eŭropo ankaŭ ludu sian rolon en la estigo de pli justaj socioj kaj en la eliminado de malriĉeco en aliaj mondopartoj.** Ni devas vastigi la penojn por plenumi la jarmilajn evoluigajn celojn. La principo de tutmonda sociala kaj ekologia justeco devas gvidi ĉiun EUan politikon kaj ĝian sintenon en tutmondaj institucioj. Verduloj volas certigi, ke eŭropaj registaroj finfine plenumu siajn delonge donitajn promesojn kaj altigu la EUan eksterlandan evoluigan helpon al 0,56% de la malneta enlanda produkto ĝis 2010 kaj al 0,7% ĝis 2015.

**La Verda Nova Konsento metas justan komercadon je la unua vico.** Komerco estu avantaĝa por ĉiu. La potenco de Eŭropa en internaciaj intertraktadoj estas multe tro ofte uzata por akiri profiton por riĉuloj koste de ekonomia, socia kaj ekologia malavantaĝoj de malriĉuloj. Eksportaj subvencioj por EUaj agrikulturaj produktoj ankoraŭ minacadas la ekonomiojn de malriĉaj landoj kaj

estu tuj haltigataj. Sociale maljustaj aŭ ekologidifektaj praktikoj de transnaciaj firmaoj aliloke en la mondo estu ne pli akcepteblaj ol se ili okazus en nia propra malantaŭa korto. Sociale kaj daŭrigeble evoluigaj paragrafoj en komercaj partnerecoj sekve estu devigaj. Monda Organizaĵo pri Komerco estu konvinkata por transformi sian liberkomercan agendon al justa kaj daŭrigebla komerca agendo, metante la protekton de komunaj bonoj kaj redukton de malriĉeco je la unua vico.

**Eŭropo praktiku tion, kion ĝi predikas.**

********************

# Demokratio kaj homaj rajtoj: respondeca EU aŭskultanta kaj aŭskultata

**Eŭropo aŭskultu kaj ĉies voĉo estu aŭdata.** Verduloj volas reformi EU-on tiel, ke ĝi povos fariĝi vere partoprena demokratio.
Kiel la nura EUa institucio rekte elektita de la popolo, la Eŭropa Parlamento devus rajti iniciati leĝon. Parto de EUaj parlamentanoj devus esti elektata el tuteŭropaj internaciaj listoj, kiuj ebligus al civitanojn voĉdoni favore al kandidatoj, kiuj reprezentas la tuton de EU, anstataŭ nur por kandidatoj el sia nacia aŭ loka voĉdona distrikto. Pli multo estas farenda por instigi junulojn partopreni, ekzemple per malaltigo de la voĉdona aĝo. Civitanoj ankaŭ havu la eblon de rekta demokratio per Eŭropaj referendumoj pri demandoj koncernantaj la tutan Eŭropon.

Verduloj batalos por apliki la Ĉarton de Fundamentaj Rajtoj por inkluzivi ĉiujn socianojn kaj defendi la rajtojn de senŝirmaj kaj malplimultaj grupoj. Tio implicas bataladon por egalrajteco de virinoj, etnaj malplimultoj, inter kiuj la romaoj, homoj kun kriplaĵoj, lesbaninoj, gejoj, duseksuloj, transseksuloj kaj religiaj malplimultoj kaj ankaŭ por sociaj kaj civitanaj rajtoj. Tio ankaŭ signifas daŭrigon de la batalo kontraŭ rasismo, ksenofobio, antisemitismo kaj aliaj religiaj maltoleremoj, seksismo, diskriminacio surbaze de seksa orientiĝo kaj seksa identeco kaj ĉiaj perfortaj politikaj ekstremismoj en Eŭropunio. Homaj rajtoj estas por ĉiuj, precipe ene de EUaj membroŝtatoj.

**La fundamenta rajto je egaleco inter viroj kaj virinoj devas fariĝi realaĵo.** Bona leĝaro jam ekzistas sed estas disigita en Eŭropo. Verduloj volas, ke la plej bonaj naciaj leĝoj estu aplikataj en la tuta EU, ĉu ili koncernas egalecon, elekteblojn, hejman perforton, gepatran libertempon aŭ politikan reprezentadon. Nur unu el tri EUaj parlamentanoj kaj komisionanoj estas virino. Verduloj havas egalan nombron da viraj kaj inaj EUaj parlamentanoj kaj ni volas, ke EU sekvu nian ekzemplon.

La Verduloj postulas plenan malkaŝemon por ĉiuj en decidofaraj procezoj koncernajn EU-on. Tio implicas severan kontraŭagadon al korupto je ĉiuj niveloj. EU mem pli respondecu antaŭ sia publiko. Jam venis la tempo por malfermi fermitajn dosierojn kaj fermitajn pordojn. Verduloj ankaŭ daŭre prilumados la ombrecajn kaj potencajn kampanjistojn (lobiistojn), kiuj provas influi decidojn en Bruselo. **Malkaŝemo estu devigo, ne opcio.**

Organizita krimo fariĝis internacia fenomeno kaj postulas atentegon en ĉiuj membroŝtatoj. La krimulaj profitoj kreskis eksponenciale kaj en kaj ekster EU. Penoj kontraŭbatali krimajn organizaĵojn, dume sekurigante la civitanajn liberojn, estas unu el la prioritatoj de Verduloj.

Amaskomunikiloj ludas kernan rolon en la demokrata procezo. Verduloj daŭre defendos amaskomunikilan plurismon kaj sendependecon kaj la gazetaran liberon en kaj ekster Eŭropunio.

La Verda Nova Konsento signifas Eŭropajn valorojn kaj individuajn liberojn. Ĉiuj vivantaj ĉi tie ĝuu liberan opinion kaj religian esprimon ene de sekulara socio.

Malfacile akiritaj rajtoj kaj liberoj ne estu oferataj nome de la “batalo kontraŭ terorismo” aŭ asertitaj minacoj al sekureco. La samo aplikiĝu pri interreto. Verduloj kredas, ke ciferecaj rajtoj estu egalvaloraj al tiuj de civitanaj rajtoj. Registaroj kaj komercaj interesoj ne havu supereconu pri via privateco. **Viaj datenoj estas via afero.**

Eŭropo jam ĉiam estis kontinento de migrado kaj enmigrado. Verda Nova Konsento kondukos al Eŭropa enmigrada politiko, kiu donos justan ŝancon por tiuj, kiuj deziras loĝi en EU. La sieĝotima pensmaniero de ‘Fortikaĵo Eŭropo’ ne rajtus superi.

**Enmigrado estas ŝanco, ne minaco.** Ni bezonas konstrueman politikon, kiu ebligos homojn veni ĉi tien laŭleĝe kaj efike. Enmigrintoj, kiuj laboras en EU-on meritas egalrajtecon kaj egalpagon, kaj ankaŭ la ŝancon de eŭropa civitaneco kaj la rajton partopreni en la politika procezo.

**Tiuj, kiuj serĉas azilon en Eŭropo, meritas esti pli bone traktataj.** Verduloj kontraŭis subpremajn leĝojn pri resendo de nedeziritaj migrintoj kaj daŭrigos batali kontraŭ malhomecaj aŭ ksenofobiaj leĝoj. Eŭropo havas la devon provizi loĝadon kaj protektadon al tiuj, kiuj bezonas ĝin. Eŭropo devus helpi homojn veni ĉi tien loĝi en laŭleĝa maniero. Ĝi nur povos fari ĉi tion efike kiam ĉiuj EUaj landoj dividas la penon anstataŭ lasi la plej gravajn ŝarĝojn al la limlandoj. Revizio de la Dublina Konvencio, kiu celas harmoniigi la EUan azilpolitikon kaj garantii protekton konforme al internaciaj devontigoj, estas devo. Eŭropo devas ankaŭ pli peni por batali kontraŭ la malestiminda translima ŝakrado pri viroj, virinoj kaj infanoj en sia teritorio.

Eŭropunio gvidu ekzemplodone en sia internacia engaĝiĝo: tio implicas novan stilon de eksterlanda politiko. Eŭropo dediĉu sian energion por solvi la fundamentajn kaŭzojn de internaciaj streĉoj kaj ne nur batali kontraŭ ties videblajn manifestadojn. EU plifortigu plurpartiajn instituciojn kaj la internacian juron, ĝi koncentriĝu al instrumentoj pri civila eksterlanda politiko kaj ĝi respektu la principon de maksimuma justeco en sia tuta ekstera politiko, inter kiu la komerca. Eŭropa politiko estu ĉampiono pri paco, demokratio kaj homaj rajtoj en la mondo kaj faru tion konstante kaj kohere. EU ankaŭ dediĉu pli da energio kaj resursoj por subteni la internacian komunumon (precipe UN) en traktado de konfliktoj, kiuj estas delonge preteratentitaj.

Internacia kunlaboro kaj humanitara helpo estu prioritataj. Establo de eŭropa civila packorpuso preta plenumi nemilitiarajn intervenojn por humanitaraj celoj estus grava parto de ĉi tio.

Ni volas Eŭropunion, kiu nutras demokration kaj homajn rajtojn, dume antaŭenigante pluralisman civilan socion tutmonde. **Homaj rajtoj ne estu foroferataj al ekonomiaj profitoj.**

# Verda Nova Konsento por nova Eŭropo

Verduloj batalis por daŭrigebla, sociala kaj pli demokrata Eŭropo ekde nia eniro en la Eŭropan Parlamenton en 1984. Ni agnoskas la neceson de realaj eŭropaj solvoj por eŭropaj problemoj. Tiele ni estas la plej firme kunlaboranta politika familio en la eŭropa parlamento. Tio helpis nin pliigi nian batalpretecon kaj ege pli influi la eŭropajn decidojn ol niaj nombroj normale ebligus.

Ni kredas, ke Verda Nova Konsento necesas por venki la financan, ekonomian, resursan, energian kaj klimatan krizojn, kiujn ni alfrontas. La Verda Nova Konsento signifas amasajn investojn en daŭrigeblajn sektorojn, kie vivkvalito kaj kreado da milionoj da ‘verdaj laborpostenoj' havos prioritaton.

Por realigi Verdan Novan Konsenton necesos konstrui aliancojn. Ni serĉos alianculojn en la civila socio, en parlamentoj kaj en registaroj, kiuj klopodos atingi tiun ŝanĝon. Tamen, certigi, ke Eŭropo revenu sur la ĝustan vojon, signifas, ke ni engaĝiĝu, konvinku aliulojn voĉdoni 'verde'. Vi povas influi tion, kio okazas en Eŭropo.

**Elektu Verdan Novan Konsenton :**




**WWW.EUROPEANGREENS.EU**